


BULGARA ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

- Ni lernas
ankau
Esperanton
-
- Nia festo
-
- BuLEA terore
persekutita
-
- VI. Dimitrov—
la Majstro
-
- Folklora
festivalo
-
- Organiza vivo
-
- Verdaj
steletoj
-
- Arkeologio
-
- Filatelolo
-





NI LERNAS ANKAŬ ESPERANTON!...

Sabate posttagmeze en la korto de lernejo „Diĉo Petrov“ en Svoge estas senbrue. La lernantoj jam delonge estas foririntaj. Iuj el ili veturas hejmen per aŭtobusoj, aliaj — per vagonaro. Sed estas ankaŭ lernantoj, por kiuj en la sabata posttagmezo la lernotago ankoraŭ ne finiĝis — ili vizitas la lecionojn por fakultativa lernado de la Internacia Lingvo Esperanto.

— Tanja! Vi estas respondeculino de la klaso! — mi aŭdas la voĉon de Petja Borisova. — Mi timas, ke iuj el la lernantoj eble ne venos! Ja estas ankaŭ tiaj, kiuj devas veturi, ĉu ne?

— Ĉiuj scias kaj ĉiuj venos! — sin aŭdigas Temenujka. — Jen, jam venis Zoja el vilaĝo Zimevica, venis Gabriela el Svidnja, Tatjana el Iskrec, Petrana el Lakatnik. Elena kaj Aneta el Svoge ankaŭ ĉeestas. Ankaŭ la grupo el Cerovo certe venos — jen la vagonaro jam eniras la stacidomon.

— Petjo, ĉu vi havas kajeron? Ja ne estas eble lerni fremdan lingvon ne skribante!

Mia apero ĉesigis la konversacion. Mi eniris la klasĉambron per timemaj paŝoj, kun emocie batanta koro. Min maltrankviligis ĉio — ĉu la lernantoj vizitos miajn horojn, ĉu ili okupigos serioze pri la lingvo?

Sed min renkontis ridetantaj vizaĝoj. La klaso estis preta por laboro. Forestis nur du lernantinoj.

— Gelernantoj, kiu estas deĵoranto?

Petjo, kompreninte, ke mi demandas pri la deĵoranta lernanto, levis la manon kaj diris:

— Hodiaŭ estas nia unua lernotago. Mi deziras esti la deĵoranta lernanto!

Mi zorgeme skribis sur la nigra tabulo la esperantan alfabeton.

— Vi ĉiuj lernas francan, germanan aŭ anglan lingvon, do vi jam konas la latinan alfabeton. Kaj la ses literoj kun supersignoj tute ne estas malfacilaj — mi diris. — Ankaŭ multaj vortoj — ekzemple „fenestro“, „pordo“, „tablo“ — estas anticipe konataj al vi.

Post la leciono ni lernis kanti la tradukitan en Esperanto kanton pri Svoge.

La horo nerimarkite finiĝis. Dum la paŭzo Tanja Vaĉeva diris al mi:

— Mi lernas francan lingvon, sed mi plezure vizitas ankaŭ la lecionojn de Esperanto, ĉar ili estas interesaj. Jen, pasis nur tri lecionoj, kaj ni jam scias multajn vortojn. Mi jam povas respondi al multaj demandoj: kie mi loĝas, en kiu klaso mi lernas, kiu estas nia direktoro, krome mi scias la nomojn de la objektoj en la klasĉambro. Generale, la Internacia Lingvo plaĉas al mi. . .

— Ankaŭ la kantoj, kiujn ni lernas kanti estas belaj — sin aŭdigas Maria Ignatova. — Veturante kune, ni kantas ilin. Kun ili ni partoprenos festivalojn, amuzprogramojn. En la naŭa klaso ni lernas fremdajn lingvojn, sed ni malmulte kantas.

— Mi senpacience atendas la sabatan tagon — rapidas diri Tanja Rusislavova. — Hodiaŭ mi devis veturi kun miaj gepatroj, sed kiel vi vidas — mi estas ĉi-tie.

— Mi kolektas insignojn kaj en mia kolekto mankas la esperanta insigno — diras Radoslav. — Hodiaŭ mi ne kunportas kajeron, sed mi memoras ĉion, kion ni lernis dum la du lernohoroj. Se ni havos hejman taskon, mi certe bone plenumos ĝin.

Mi forlasis la klasĉambron kun ĝoja espero pri bona sukceso. Kiam mi eniris la instruistan ĉambron, tie estis la direktorino de la lernejo Maria Ĉarova. Si demandis min kiel pasis la hodiaŭa leciono kaj ĉu ĉeestis ĉiuj lernantoj, kiuj venas el la najbaraj loĝlokoj. Eksciinte, ke el la grupo forestas nur du lernantoj, ŝi esprimis esperon, ke ankaŭ estonte ĉiuj regule vizitos la lecionojn.

La pozitiva rilato de la lernantoj al la okupoj kaj la intereso al la Internacia Lingvo estas garantio por la sukceso, kiun atendas de ni la direktorino kaj la tuta instruista kolektivo.

ELENA RADENKOVA,
instruistino de Esperanto en
lernejo „Diĉo Petrov“ — Svoge



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 51

FEBRUARO

2 • 1982

NIA FESTO

En 1982 ni, bulgaraj esperantistoj festos la 75-jaran jubileon de nia tutlanda organizaĵo — Bulgara E-Asocio, en kies vicoj formiĝis tri esperantistaj generacioj.

Ni permesas al ni turni rigardon al la unua esperantista generacio, kiu preparis la grundon por fonda de BEA. Tio estis ĉe la sojlo de la dudeka jarcento. Tiam nia ŝtato estis juna, ĵus liberigita elsub otomana jugo. La ritmo de la vivo estis malrapida, regis primitivaj moroj. Tamen jam formiĝis politikaj organizaĵoj, inter ili la partio de la bulgara laborista klaso, kiu nun estas avangardo de nia popolo. Tiutempe la sciamaj bulgaroj ĉerpis kulturajn informojn el Ruslando. De tie venis ankaŭ la Zamenhofa humanismo.

La unuaj esperantistoj estis homoj inteligentaj. Ili propagandis la lingvon, verkante lernolibrojn kaj vortarojn, eldonante broŝurojn kaj gazetojn: „Mondlingvisto“ kaj „Unua paŝo“ en Sofio, „Rondiranto“ en Plovdiv, „Trumpetisto“ en Ruse. Ili semis bonan semon, el kiu ekgermis societoj „Lumo“ en Tirnovo, „Stelo“ en Plovdiv, „Aŭroro“ en Sofio. Do el iliaj radikoj kreskis nia verda kverko Bulgara Esperantista Asocio.

Tiu generacio kunpuŝiĝis kun diversaj problemoj — manko de rimedoj, moko de l'filistoj k. s., sed ĝi sin gvidis per la vortoj de la Majstro: „Nur rekte, kuraĝe kaj neflankigante, ni iru la vojon celitan“. Plej dignaj reprezentantoj de tiu generacio estis Miroslav Bogdanov, Hristo Popov, Georgi Oreŝkov, Hristo Rjajovski, Simeon Petkov, Dimitar Siŝmanov, Dimitar Malĉev, Georgi Nikolov kaj St. Minkov.

La vidpunktoj, opinioj kaj konsideroj de la dua generacio formiĝis dum la Unua Mondmilito kaj precipe post la Oktobra revolucio, kiam ekestis forta antagonismo inter la du mondsistemoj. Parto de la bulgaraj esperantistoj simpatiis al la ideoj de Lenin kaj en 1920 ili fondis la organizaĵon „Balkana Liberiga Stelo“ kun la celo meti Esperanton en servo de la laborista klaso. Meritaj agantoj de tiu

organizaĵo estis Panajot Kolev, lektoro de Esperanto en la Ŝtata Blindula Instituto, Stefan Nenkov kaj Maleŝko Ŝiŝkov, kiu ankaŭ nun aktivas en la movado.

Laŭleĝa heredanto kaj daŭriganto de „Balkana Liberiga Stelo“ estis la Bulgara Laborista Esperanto-Asocio, kiu faris siajn unuajn paŝojn en la jaroj de proleta impeto — 1929/1930. BuLEA eldonis gazeton „Balkana Laboristo“, „Internacia Lingvo“ kaj „Laborista-Kampanara Korespondanto“, diversajn broŝurojn, vortarojn kaj lernolibrojn por laboristoj. BuLEA intensigis la kontaktojn kun alilandaj laboristaj asocioj, precipe kun Sovetrespublikara Esperanto-Unuiĝo kaj kun la germana LEA. En 1931 BuLEA aliĝis al la Internacio de Proletaj Esperantistoj. En la gvidorganoj de BuLEA tiutempe aktivis Asen Grigorov, Nikola Aleksiev, Angel Petkov — Angelo, Simeon Petrov, Atanas Lakov, Trajana Petkova, Tinka Kolarova kaj aliaj.

Paralele funkciis BEA kun siaj 26 lokaj grupoj kaj 500 membroj. BEA sukcesis oficiale enkonduki Esperanton kiel nedevigan lernobjekton en la programoj de la „realaj lernejoj“ (por geknaboj en aĝo de 14–16 jaroj). En 1925 la faŝista ministro de klerigado malpermesis la instruadon de Esperanto en lernejoj. BEA faris multon por la propagando de Esperanto en nia lando. Estis eldonitaj kaj venditaj sume 70 000 lernolibroj, 12 000 vortaroj de Atanas D. Atanasov (ADA) kaj Ivan Krestanov. Aperis „Bulgara Antologio“, kompilita de I. Krestanov, „Versaĵoj“ de H. Bolev en traduko de Ivan Dobrev, „Bulgaraj rakontoj“ de Ivan Vazov en traduko de ADA, „Nunttempaj rakontoj“ de G. Stamatoŭ k. a.

Per paroladoj kaj artikoloj propagandis la lingvon Ivan Krestanov, Panajot Hlitrov, Atanas D. Atanasov, Radoslav Triĉkov, Ilija Silvestriev, St. Hesapĉiev, Ivan Kovaĉev, Georgi Dimov, Petro Pamporov k. a.

Post malpermeso de la agado de BuLEA, la laboristaj esperantistoj transiris organizile en la vicojn de BEA. Antaŭ kaj dum la Dua

Mondmilito respondecajn postenojn en la movado okupis prof. Stojan Ĝugev, prof. Vasil Peevski, Ivan Keremidčiev, Vasil Bozarov, Ivan Vasilev, Violin Oljanov, Ivan Bataklijev, G. Dolapčiev. La faŝista polico ĝenis kaj persekutis la agantojn, sed ili montris sin harditaj batalantoj kaj malgraŭ la diversaj obstakloj daŭrigis la laboron por paco, kontraŭ militismo kaj faŝismo.

La nuna generacio laboras ĉe tute favoraj kondiĉoj. Nia popola ŝtato subtenas morale kaj materiale la bulgaran E-movadon. BEA estigis sufiĉe amasa organizaĵo kaj ĝuas aŭtoritaton kaj en la lando kaj ekster ĝi. BEA estas unu el la plej fortaj landaj asocioj, aliĝintaj al UEA. Regule aperas la revuoj „Bulgara Esperantisto“, „Paco“, „Scienca Mondo“ kaj kelkaj bultenoj — organoj de la internaciaj sekcioj. Ĉiujare estas eldonataj lernolibroj, vortaroj, beletraĵoj kaj poeziaj verkoj. Esperanto denove estas lernobjekto en la mezlernejoj. Ankaŭ en kelkaj superaj lernejoj oni instruas oficiale Esperanton. Ĉiujare okazas diversaj aranĝoj en preskaŭ ĉiuj distriktoj urboj. Nia asocio gastigis du universalajn kongresojn, du kongresojn de TEJO, kongreson de IFEF. Pli ol 20 jaroj funkcias la Bulgara Esperanto-Teatro. Aktivas multaj sekcioj de BEJ, de medicinistoj, fervojistoj, instruistoj ktp.

Tio tamen ne sufiĉas. La ritmo de la vivo estas rapidigita, la vivpanoramo estas ege

vasta. Kaj ni devas adaptiĝi al ĝi, se ni volas ke nia afero progresu.

Nun la homaro staras antaŭ la dilemo de Hamleto: „Esti aŭ ne esti“. Se la detruaj fortoj de la imperiismo trudos al la homaro la „limigitan nuklean militon“, la viktimoj estos miloble pli grandaj ol tiuj dum la Dua Mondmilito. Kiel konsekvencaj internaciistoj ni de vas dediĉi niajn fortojn al la pacbatalo, pe kio oni povas bridi la atomajn maniakulojn. Ĉiu, kiu volas konservi sian vivon kaj la vivon de la homaro, devas batali por senarmigo, kontraŭ la militminaco.

La progreso en la sfero de scienco, tekniko kaj produktado estas grandega, sed ĝi havas ankaŭ negativajn flankojn. La vivo surtera estas rompebla, delikata kaj oni devas zorge rilati al ĝi, gardi ĝin. En multaj landoj jam agas bone organizitaj ekologiaj movadoj, kiuj celas sendanĝeran ekzistadon de ĉiuj vivoj. Ankaŭ BEA devas kontribui por konservado de la naturmedio.

Nun la plej grava sfero en la konstruado de matura socialismo estas la sfero ekonomika. Niaj membroj devas aktive helpi la pluan ekonomian impeton de nia lando.

Ni esperu, ke la jubilea jaro estigos turnopunkto en nia laboro, ke BEA konkeros novajn sukcesojn, irante en takto kun nia tempo.

ĤRISTO GOROV,
prezidanto de BEA

«BULGARA ESPERANTISTO» KONTRAŬSTARIS LA RASISMON

En 1933 la faŝistoj uzurpis la ŝtatpotencon en Germanio. Komencis sovaĝaj persekutoj kontraŭ komunistoj, hebreaĵoj kaj esperantistoj. La rasismo estigis oficiala doktrino de la plej agresema imperiisma ŝtato en Eŭropo. Sed, persekutante la esperantistojn, la germanaj faŝistoj tamen provis profiti Esperanton por siaj celoj kaj utiligi la internaciajn ligojn de la esperantistoj por popularigi sian kanibalsman ideologion tra la tuta mondo.

Kaj jen, jam en la unuaj jaroj de sia regado ili komencis eldoni en Esperanto propagandan literaturon. Tamen la esperantistoj en ĉiuj landoj trovis konvenan formon de reago kontraŭ la idea invado de la faŝismo en ilian medion.

Sendube nun estas interese ekscii kiamaniere reagis la bulgaraj esperantistoj. Tiam ankaŭ en Bulgario regis la faŝistoj. La redakcia paperujon de „Bulgara Esperantisto“ plenigis regule venantaj faŝismaj broŝuroj k. a. eldonaĵoj: la aroga pseŭdoscienco de l'rasismo vane klopodis prui, ke la „pura“ germana raso estas destinita de la providenco por regi

la homaron. La ceteraj „rase malpuraj“ popoloj kaj nacioj devis esti sklavo kaj servistoj de la senbridaj pretendantoj pri mondregado.

La kondiĉoj estis tre malfavoraj. Sed fari nenion estis neeble. La horo de frontado kontraŭ la rasismo batis. Kaj en „Bulgara Esperantisto“ de marto — aprilo 1935 aperis respondo, per kiu la redakcio de la gazeto, kies ĉefredaktoro tiam estis Ivan Ĥar. Krestanov, koncize, sed klare kaj kategorie deklaris sian malaprobon de la rasismo kaj de ties agentoj en la germana Esperanto-movado.

Tiu konciza respondo fakte estas neniiga recenzo pri la faŝismaj eldonaĵoj en Esperanto. Ĝi estas la plej valora materialo publikigita en „Bulgara Esperantisto“ en la jarkolekto de 1935.

Jen estas pruvo, ke en Bulgario eĉ la neŭtrala esperantistaro kondamnis la sangsoifan rasismon de la germanaj faŝistoj, tiun danĝeran malamikon de la paco kaj amikeco inter la popoloj.

CANKO MURGIN

BULEA TERORE PERSEKUTITA

Pri la persekutado de Bulgara Laborista Esperanto-Asocio (BuLEA) oni povus verki eĉ tutan libron. Sed mi kontentigos en la kadro de artikolo rememorigi nur kelkajn faktojn. Mi ĉerpis ilin el deko da numeroj de „Mejdunaroden Ezik“ (Lingvo Internacia), organo de BuLEA. Bedaŭrinde mi ne disponis la tutan kolekton de 23 aperintaj numeroj.

Jam en n-ro 1-a de „ME“, aperinta la 1-an de oktobro 1931, sur la fronta paĝo oni legas jenan protestleteron:

„La faŝisma diktaturo en la persono de registaro Malinov — Ĝicev persekutas sangavede ankaŭ BuLEA. K-do Simeon Petrov, redaktoro de „Balkana Laboristo“, organo de LEA, estis jetita en la humidan cementan tombejon de la Centra malliberejo. Oni juĝos lin laŭ la monstra Leĝo por defendo de la ŝtato. For la faŝisman diktaturo! Vivu la laborista-kamparana registaro!“

Sur paĝo 3-a sub titolo „For la manojn desur BuLEA! Liberigu k-don Simeon Petrov!“ estas publikigita la plena teksto de oficiala protesto de CK de BuLEA subskribita de N. Aleksiev. Ĝin sekvas protesto de LEA-sekcio en Plovdiv.

En n-ro 2-a (15. X. 1931) sub sama titolo oni legas novajn protestojn de LEA-sekcioj en Stanimaka (nun Asenovgrad) kun la subskribo de Hristo Marinov (Gorov), en la naskurbo de S. Petrov — Berkovica, en Lom, en Sliven (sekcio „Nikolaj Nekrasov“). La laborista parlamentano S. Kucarov informas, ke policagento en Tirnovo forrabis 30 ekzemplerojn de „ME“ el la manoj de la disvendanto Jordan Dimitrov.

En n-ro 4-a (15. XI. 1931) oni trovas protestojn el eksterlando. Esperantista grupo de bulgaraj studentoj en Brno (Ĉeĥoslovakio) kaj grupo da bulgaraj laboristaj esperan-

tistoj en Marmecón à Cancan (Francio) postulas nuligon de la projektata juĝproceso kaj tujan liberigon de S. Petrov. Protestan telegramon sendis ankaŭ Internacia Komitato de Laborista Esperanto-Movado. Oni akre protestas kontraŭ la sufokigo de Laborista Esperanto-Movado en Bulgario, postulante liberigon de S. Petrov je la nomo de laboristaj Esperanto-organizaĵoj en Germanio, Britio, Francio, Hispanio, Nederlando, Belgio, Ĉeĥoslovakio, Aŭstrio, Hungario, Svedio, Pollando, Litovio, Estonio, Japanio kaj Usono. Tiu protesto estis direktita ankaŭ al la laborista gazetaro en pluraj landoj. „ME“ publikigas informon, ke la organo de Germana LEA aperigis publikan proteston pri la sama temo en sia organo „Arbeiter Esperantist“ (novembro 1931).

N-ro 6-a (15. XII. 1931) informas pri fondaĵo en Sofio de Komuncivitana komitato por plena kaj senkondiĉa amnestio de politikaj arestitoj. Laŭ invito de tiu komitato CK de BuLEA delegis al ĝi sian reprezentanton.

En n-ro 7-a (15. I. 1932) LEA-sekcioj en Plovdiv kaj Sofio plu publikigas protestojn kontraŭ la teroro. Oni citas ankaŭ la nomon de Jeko Rajčev, kelnero el Sofio, laborista esperantisto, perforte transloĝigita en provincan urbeton. Laboristaj esperantistoj el du vilaĝoj — Batak kaj Kneja (nun urboj) protestas kontraŭ persekutoj de Esperanto-kursanoj kaj aresto de k-do Savčo Negulov. De li la polico konfiskis 15 ekzemplerojn de „ME“ kaj veturigis lin al la distrikta urbo Vraca, kie la prokuroro iniciatis juĝprocecon laŭ § 7 de la Leĝo por defendo de la ŝtato.

Per la frontartikolo „La batalo por amnestio daŭras plu“, en n-ro 8 (1. II. 1932) la redakcio esprimas sian senrezervan kaj ak-



PROLETOJ DE LA MONDO, UNUIGU VIN!

Internaciisto

ORGANO DE LA KLASBATALA ESPERANTISTARO
kaj Internacia Unuiga Komitato por la Proleta Esperanto-Movado

No 38 APERAS DUSEMAINE	ADRESO de REDAKCIO, ADMINISTRACIO & INTERNACIA UNUIGA KOMITATO: Germanio, BERLIN C 25, Posifako No 2. Bata, Jozefo. Redaktas: Redakcia Kolegio. Adresaron de landoj abonejoj & literatur-perantoj, vidu en la interno de la gazeto.	2. JARO 1932 APRIL 18
------------------------------	---	-----------------------------

tivan subtenon al la tulpopola batalo por plena kaj senkondiĉa amnestio. Sur paĝo 2-a oni legas proteston de LEA-sekcio en Plovdiv kontraŭ la kruela persekutado de laboristaj gvidantoj, postulante ĉesigon de la teroro kontraŭ la laborista movado kaj liberigon de Trifon Parov, sekretario de Unuiĝo de Proletaj Liberpensuloj.

Denove oni trovas frontartikolon en la duobla n-ro 14—15-a (1—15.5.1932) pri „La teroro kontraŭ la laborula gazetaro kaj „ME“. Jen kelkaj linioj el ĝi: „La teroro estas monstra, nevidita. La „popol-bloka“ registaro estas decidinta sufokigi per sistema konfiskado la laboristan gazetaron, fermi la buŝon de nia laborista klaso. La pasintan jaron oni arestis k-don S. Petrov, redaktoron de „Balkana Laboristo“. Jam duan monaton estas tenata en la frostegaj keloj de Centra malliberejo k-do Angel Petkov, redaktoro de „ME“. Tri sinsekvaj n-roj de „ME“ estis konfiskitaj“. La artikolo finiĝas jene: „Ni pruvu nian vivkapablecon, ni pruvu, ke ni povas rebati la furiozan militiron kontraŭ „ME“, ke tamen la gazeto plifortigeĝas kaj daŭre lumos spite al la klopodoj de la gufoj estingi ĝin. For la teroron kontraŭ la laborula gazetaro! Vivu „ME!“

Sur paĝo 2-a tuta kolumno estas dediĉita al novaj protestoj ricevitaj de bulgaraj esperantistaj studentoj en Brno, de LEA-sekcio en Varna, kontraŭ la aresto de k-do Petkov kaj de triopo da respondecaj aktivuloj de loka laborista movado, inter kiuj la prezidanto de LEA-sekcio k-do Janko Marinov. En la policejo oni lin bategis kaj perforte loĝigis en vilaĝon Kilifarevo, kie li povus trovi nenian laboron por sin vivteni. Mem k-do Marinov sendis protestleteron el Kilifarevo. Li klarigas, ke oni bategis lin nur

pro tio, ke li disvastigis laborulajn gazetojn kvankam permesitajn de la cenzuro por disvastigo. Jen kuraĝaj vortoj el lia letero: „Mi deklaras, ke per similaj metodoj vi ne sukcesos ŝtopi la buŝon de la laborula popolo kaj sufokigi ties batalon. Finen al konfiskado kaj arbitraĵoj!“

Je la Unuamaja festo (1932) la polico pafmortigis en vilaĝo Toros (nun Lazar Stanevo) la proletan esperantiston Dilo Jotov, ferlaboristo, aktivulo de BuLEA. La Centra Komitato adresis al la ministro de internaj aferoj (kun kopio al la gazetaro) akran proteston subskribitan de Nikola Aleksiev, sekretario de BuLEA. Jen la finaj vortoj: „Antaŭ la memoro de la kara viktimo ni — liaj kamaradoj, organizitaj en BuLEA, deklaras, ke ni daŭrigos la batalon kontraŭ la teroro de la faŝisma diktaturo ĝis ĝia frakaso kaj por starigo de registaro de laboristoj kaj malriĉaj kamparanoj“.

En la sama n-ro „ME“ donas lokon al nekrologo pri Dilo Jotov subskribita „De liaj kamaradoj-esperantistoj“. Ĝi finiĝas per juro: „Kamarado, vi ligis vian nomon kun la Unua de majo. Ni sekvos vian vojon de proleta batalanto!“

Kiel videble, eĉ sen speciala analizo kaj komentario, la sekaj faktoj nur parte eltiigitaj el la paĝoj de „Mejdunaroden Ezik“, atestas sufiĉe klare pri la heroo agado de l' anaro de Bulgara Laborista Esperanto-Asocio kaj ties gazetaro. Antaŭ la heroo memoro de la batalantoj, oferintaj sian liberon kaj vivon, ni klinu kapojn kaj silente juru en ni mem, ke ni restos iliaj fidelaj sekvantoj ĉe solvado de la aktualaj taskoj de Bulgara Esperanto-Movado.

NIKOLA ALEKSIEV,
esperantista veterano

DISTINGITAJ ESPERANTISTOJ

En pasintjara agado de BEA gravan lokon okupis la celebrado de la 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato. Lige kun la jubileo en Ŝumen okazis speciala Internacia Scienc-praktika Konferenco.

Bulgaraj esperantistoj — artistoj, kantistoj, instrumentistoj kun granda sukceso sin prezentis per riĉenhava koncerto kaj literaturaj-muzikaj programoj kun enkonduka parolado pri la 1300-jara vojo de evoluo de la bulgara ŝtato en multaj urboj de Bulgario kaj en eksterlando — en Moskvo, Leningrado, Kievo, Tallin, Riga (USSR), en Budapeŝto, Bekeŝaba kaj Niŝredhaza (Hungario).


Ĉiuj bulgaraj E-eldonoj dediĉis multajn kaj variajn materialojn al la 1300-jara jubileo. La asocia organo „Bulgara Esperantisto“ enkondukis specialan rubrikon „1300 jarojn Bulgario“. Al la sama temo estis dediĉita ankaŭ la programo de la XIV-a Nacia Revuo de la Esperantista Parolado kaj Kanto, okazinta en urbo Pazarĝik.

La III-a Internacia Medicinista Konferenco en urbo Ruse estis akompanita de ekskursoj al historiaj lokoj: Veliko Tirnovo, Madara, Pliska, Preslav, Ŝumen.

La kontribuo de la bulgaraj esperantistoj al la celebrado de la tulpopola jubileo estis alte taksita de la Tutnacia komitato „1300 jarojn Bulgario“. Je plenkunsido de Sofia Urba Estraro de BEA, okazinta la 23-an de decembro pasintjare, estis disdonitaj la honordiplomoj kaj jubileaj medaloj al la membroj de BEA pro ilia aktiveco:

1. Nano Canov Kjuĉukov — vicprezidanto de BEA;
2. Petar Angelov Todorov — vicprezidanto de BEA;
3. Kunĉo Ivanov Valev — ĝenerala sekretario de BEA;
4. Ĥristo Kanev Ivanov — prezidanto de UE de BEA en Sofio;
5. prof. d-ro Kiril Petkov Popov — prezidanto de Medicinista sekcio de BEA;
6. Krestju Dimitrov — Karucin — membro de la Buroo de BEA;
7. Donĉo Simeonov Ĥitrov — ĉefredaktoro de revuo „Bulgara Esperantisto“;
8. Ĥristo Manolov Ĥristov — prezidanto de societo „Ĥristo Kozlev“ en Polŝi Trambes;
9. Petko Petrov Arnaudov — sekretario de DE de BEA en Pazarĝik;
10. Nikola Iliev Nikolov — E-aktivulo kaj sociaganto;
11. UE de BEA en Sofio;
12. DE de BEA en Ŝumen;
13. DE de BEA en Ruse;
14. E-societo „Ĥristo Kozlev“ en Polŝi Trambes.

FILO DE LA BULGARA LABORISTA KLASO



Ne nur kiel homo, kiel politika ka ŝtata aganto, kiel pensulo kaj verkisto, sed ankaŭ kiel oratoro, kiel inspiranto kaj gvidanto de la proleta revolucio Georgi Dimitrov plene, en plej alta grado manifestis la kvalitojn, virtutojn, intelektan potencon, moralan forton, la spiriton kaj la energion de la laborista klaso, al kiu la historio komisiis la taskon ŝanĝi la socion, enkorpiĝi la humanismon en la vivo, malkovri la vojon de la popoloj al ĉiufanka materiala kaj spirita progreso.

La laboramasoj en kapitalisma Bulgario organizis protestajn demonstraciojn sur stratoj kaj placoj, por manifesti siajn justajn postulojn por plibonigo de la vivkondiĉoj de la mizeranta laborista klaso. Tiuj ĉi demonstracioj, organizataj kaj gvidataj de la Bulgara Laborista Socialdemokratia Partio (striktaj socialistoj), kaj pli malfrue de la Bulgara Komunista Partio, transformiĝis en politikajn agojn kontraŭ la faŝistaj diktatoroj kaj teroro. Kaj tre ofte sur la tribuno estis Georgi Dimitrov, la fidela gvidanto de la bulgara laborista klaso.

En sortodecida por la popoloj periodo li starigis sur la tribuno de la Lajpciga juĝejo, por transformi la halon en dramatan arenon de ideoj kaj por defendi la politikajn

poziciojn de la komunismo, la valorarojn de la homa kulturo. Li estigis esprimanto de la pensoj kaj deziroj de milionoj da homoj, subpremataj aŭ minacataj de la faŝismo. En la kunpuŝigo de la du antagonismaj, profunde malamikaj vivkonceptoj, li transformis sian parolon en lumjetilon, kiu tranĉis la mallumon de la bruna sklaveco kaj desegnis la vojon de la batalo — la vojon de la venko kaj la savo.

Batalanto kaj oratoro el la klaso de la titanoj, li gajnis la rekonon de la tutmonda proletaro. Ĉiuj grandaj personecoj en Eŭropo kaj en la mondo notis la kuraĝon kaj la elokventecon, per kiuj li donis la frakasan moralan-politikan baton sur la programo, la institucioj kaj la ĉefoj de la nacionalsocialismo.

Georgi Dimitrov — rekte aŭ malrekte — ricevis ankaŭ la rekonon de la burĝa gazetaro. La angla „Times“ estis devigita noti, ke „tiu ĉi bulgaro posedas evidentan dignosenton“. Kaj „New York Times“ substrekas: „En la vortoj, kiujn li jetas en la vizagon de la juĝistoj: „Mi ne estas ŝuldanto, sed kreditoro“ estis io el la majesteco de la historiaj minutoj“.

En kolerplenaj artikoloj, verkitaj sub la senpera impreso de la proceso en Lejpcigo, reprezentantoj de la nazia gazetaro faris konfesojn, kiuj havas aparte gravan signifon por la karakterizo de Georgi Dimitrov kiel proleta gvidanto kaj oratoro.

„Neu Leipziger Zeitung“ skribas: „Li, la bulgaro — estas homo el la popolo, kiu estigis personeco nur dank'al siaj propraj fortoj kaj laboro. . . Li estas psikologo. . . Homo kun vulkaneca temperamento. . .“

„Leipziger Neueste Nachrichten“ substrekas, ke dank'al la konduto de la komunisto Georgi Dimitrov la proceso estigis „giganta“. En artikolo dediĉita al la proceso, la gazeto skribas:

„En la personeco de Dimitrov la komunismo estas ne nur flamo, ne nur programo por agado, sed ankaŭ teruriga politika realaĵo. . . Li postulas tuj transformi la tribunon en politikan arenon. . . La kunsidhalo subite evidentiĝis ŝargita per politika energio. . .“

Du jarojn pli malfrue li starigis sur la tribuno de la historia Sepa Internacio — la plej alta tribuno tiutempe, por alvoki al batalo ĉiujn subpremitajn homojn — al batalo por paco, demokratio kaj progreso. Por la laborhomoj liaj vortoj sonis kiel revelacio, kiel fonto de certeco en la morgaŭa tago, kiel bataltrumpeto, kaj por la malamikoj — kiel klakado de skurgo.



Parolas Georgi Dimitrov...

La sciigo, ke li parolos, amasigis milojn da ordinaraj homoj sur la liberaj placoj de la libera patrolando.

Mi havis la enviindan feliĉon esti proksime de li en la lastaj jaroj de lia vivo, spiri la atmosferon de streĉiteco, en kiu li preparis siajn famajn paroladojn kaj raportojn, esti intima atestanto de la krea apogeo de tiu ĉi proleta Anteo, senti la neesprimeblan ĝojon,

ke mi aŭskultas la voĉon de la proleta revolucio, brile enkorpiĝitan en lia potenca penso, parolantan per lia nekomparebla elokventeco sub la bulgara ĉielo kaj sur la placoj de la frataj landoj.

La impresoj, kiujn lia parolo faris sur la publikon, estis vere fortega. Ĝi havis magnetan forton...

Nun la rememoroj revenigas min al la 24-a de marto 1948 — al la tago, kiam li revenis el Moskvo post la subskribo de la Unua bulgara-soveta kontrakto por amikeco, kunlaborado kaj reciproka helpo... Placo „Naŭa de septembro“, la najbara ĝardeno kaj la stratoj ĉirkaŭe estis plenplenaj de emociitaj homoj. Ili venis ĉi tie por aŭskulti liajn vortojn en tiu granda por nia historio horo, por esti kune kun li en tiu ĉi sortodecida momento...

Kaj jen Dimitrov aperis sur la balkono de la Ministra Konsilantaro (la konstruaĵo de la nuna Nacia Bildgalerio). Li kaptis per rigardo la homamasojn sur la placo. Lia voĉo eksonis super la ĉefurbo, super la patrolando — pura, klara, emociplena, potenca:

— ...Hodiaŭ ni revenas kun subskribita kontrakto inter Sovetunio kaj Popola Respubliko Bulgario, kio estas granda historia evento. Nun nia popolo kaj nia popola respubliko estas ne nur fidelaj amikoj de la sovena popolo kaj de Sovetunio. Post la subskribo de tiu ĉi kontrakto ili estigas iliajn fidelajn aliancinojn por la komuna prospero de niaj popoloj kaj en intereso de la internacia paco...

Per sia potenca parolo Dimitrov vokis al batalo kaj laboro, juste klarigis la sencon de la historiaj eventoj, direktis siajn testamentajn vortojn al la estontaj generacioj.

ILIJA KJULJOVSKI

NOVAJ SUKCESOJ DE E-MOVADO EN KUBO

La Esperanto-movado en Kubo atingis novajn sukcesojn.


En Havano okazis la Unua plenkunsido de Kuba Esperanto-Asocio. La eventon partoprenis pli ol 100 aktivuloj el pluraj provincoj de la lando. En Havano funkcias kursoj, en kiuj lernas Esperanton pli ol 1000 kursanoj. Granda estas la intereso al lernado de la Internacia Lingvo ankaŭ en la provinco. Ĉefa tasko por la proksima estonto estas organizo kaj fondado de E-rondoj kaj kluboj en la tuta lando.

Okaze de la 1300-jara jubileo de Bulgario la havanaj esperantistoj aranĝis ekspozicion en la Publika biblioteko „Maksimo Comes“. Ĝin ili titolis: „Konu Bulgarijon per Esperanto“. La bulgara ambasado ankaŭ kontribuis al la sukceso, sed la plejparton de la materialoj sendis Bulgara Esperantista Asocio. La ekspozicion oni prezentos ankaŭ en la provinco.

La bulgaraj esperantistoj tre ĝojas pri la sukcesoj de siaj kubaj amikoj kaj estas pretaj subteni ilian noblan laboron.

Inĝ. P. TODOROV

INTERNACIA FONDAJO „LJUDMILA JIVKOVA“



„LAŬ LA LEĜOJ DE BELECO“ . . .

Nederlanda eldonejo „Grüner“, Amsterdam, publikigis kolekton de raportoj, artikoloj, paroladoj kaj eldiroj de Ljudmila Jivkova, titolitan „Laŭ la leĝoj de beleco“. La kolekto enhavas mallongajn biografiajn notojn pri la aŭtorino kaj detalan antaŭparolon, kiu konigas al la legantoj la aktivan partoprenon de Bulgario — lando kun dektrijarcanta historio — en la internacia kultura interŝanĝo. En la libro oni akcentas sur la problemoj ligitaj kun la publika-ŝtata principo en la kultura vivo — principo, kiu ebligis al la bulgara kulturo sekvi veran kaj originalan kurson. Gravan lokon en la libro okupas la materialoj, en kiuj oni prezentas la ideojn de la aŭtorino pri la nacia programo por estetika edukado, pri la Internacia Asembleo „Standardo de la paco“, kiu unuigis la penadojn de kreantoj kaj publiko per sia devizo „Unueco, kreado, beleco“, pri festado de la 1300-jara datreveno de Bulgario k. a.

La eldonejo substrekas, ke Ljudmila Jivkova estis unu el la plej eminentaj politikaj personecoj en Bulgario, elstara gvidanto de la bulgara socialisma kulturo.

Laŭ iniciato de la internaciaj kulturaj kaj negocaj rondoj estis establita antaŭ ne longe Internacia Fondajo „Ljudmila Jivkova“. Ĝian establon proklamis Lorenzo Gallo, ĝenerala sekretario de la plenumkomitato de la Internacia asocio „Ora Merkuro“. La Internacia Fondajo „Ljudmila Jivkova“ evoluos sur la bazo de la krea heredaĵo, de la faro kaj de la riĉa personeco de Ljudmila Jivkova. Ĝi zorgos elmontri kaj konfirmi

la rolon de arto, kulturo, scienco kaj klerigo por la formado de ĉiufanke kaj harmonie evoluintaj talentaj personecoj.

La Internacia Fondajo „Ljudmila Jivkova“ estas la unua simila institucio en la socialismaj landoj kaj celas stimuli la kreolaboron en ĉiuj sferoj de la spirita vivo. La monrimedojn de la Fondajo oni utiligos por esploro kaj popularigo de la spirita heredaĵo de Ljudmila Jivkova, por subteno de la internacia multflanka kaj duflanka kunlaborado inter la popoloj en la sfero de kulturo, arto, scienco kaj klerigo, celante profundigon de la ekonomiaj ligoj inter la popoloj, popularigon kaj propagandadon en Bulgario kaj en eksterlando de la atingoj de la bulgara kaj monda kulturo, eltrovon de talentaj infanoj kaj gejunuloj por helpi ilian evoluon en la sfero de scienco kaj arto. Diference de aliaj fondadoj ĝiaj rimedoj estas propraĵo de la bulgara popolo.

Tiu ĉi iniciato estas nova esprimo de nia konsekvenca pacama politiko. Ĝi pliriĝigos kaj evoluigos la formojn de kultura kunlaborado en la spirito de Helsinko, kio kreas kondiĉojn por plua evoluigo kaj internaciigo de la pozitivaj fenomenoj kaj procedoj en la sfero de la spirita vivo; ĝi stimulos ankaŭ la internacian procedon en la sfero de klerigado, scienco kaj arto. La Fondajo kreas eblecojn por helpi la evoluantajn landojn, por stimuli la procedojn, ligitajn kun la formado kaj sinmanifesto de iliaj naciaj kulturoj.

Por realigo de la aktiveco de l'Internacia Fondajo „Ljudmila Jivkova“ oni antaŭvidas la funkciadon de diversaj organizaĵoj kiel: Internacia Centro por Folkloro Arto kaj Humanismaj Sciencoj, Internacia Trusto por Libroeldonado, Internacia Centro por Kulturaj Manifestiĝoj, Internacia Centro por Dokumentado de la nuntempaj arto, scienco kaj klerigo, Muzeo kaj kolekto „Ljudmila Jivkova“ k. a.

La Fondajo strebos plenigi la konstatajn mankojn de necesaj internaciaj premioj en la sfero de la humanismaj sciencoj, de mondaj premioj por atingoj en la sfero de scienco kaj arto, la enmanigon de nacia premio „Ljudmila Jivkova“ al politikaj kaj kulturaj agantoj, kiuj grave kontribuis por evoluigo de la naciaj kulturoj.

La Fondajo „Ljudmila Jivkova“ prizorgos la plian evoluon de procedoj, starigitaj sub la senpera gvidado de Ljudmila Jivkova kaj ilian transformigon en daŭran internacian kulturen strategion en la nomo de la homa progreso.

Ĉu Esperanto aŭ matematiko?!...

(PETKO ARNAUDOV — 50-JARA)



La sekretario de DE de BEA en Pazarĝik Petko Arnaudov — gimnazia instruisto de matematiko, atingis sian 50-jaran aĝon.

Petko Arnaudov komencas sian vivovojojn antaŭ duonjarcento en vilaĝo Dinkata, distrikto de Pazarĝik. En sia naskiĝvilaĝo la scivolema Petko finas la elementan lernejon. Dank' al siaj sciomo kaj laboremo li estas la plej bona lernanto de Dua knaba gimnazio „Prof. Asen Zlatarov“ en Pazarĝik kaj poste — studento en la Fizik-Matematika Fakultato de la Sofia Universitato „Kliment Ohridski“.

Fininte siajn studojn en la universitato, Petko sin dediĉas al la instruista profesio. Laŭ lia iniciato en 1960—1961 en Pazarĝik estas organizita Lerneja Matematika Skolo. Profitante ĝiajn sperton kaj akiraĵojn, la Ministerio de Klerigado kreas programon por ĉiuj matematikaj skoloj en la lando. Ekde la fondiĝo de la Sekcio de Matematikistoj-komputistoj ĉe la Unuiĝo de Matematikistoj en Bulgario Petko Arnaudov estas ĝia prezidanto. Li estas ankaŭ kunaŭtoro de tri libroj pri matematiko, la materialoj por unu el ili estas kolektitaj pere de Esperanto. Inter alie Petko Arnaudov prelegas en kursoj kaj seminarioj por kvalifikado de instruistoj-matematikistoj, aktive partoprenas la agadon de la Internacia Asocio de Matematikistoj. En 1974 li estas distingita per la insigno „Distingito de la Ministerio de Popola Klerigado“.

Ankoraŭ gimnaziano, jam en 1947 Petko Arnaudov aliĝas al la bulgara E-movado kaj post liaj profesiaj interesoj pri matematiko Esperanto estiĝas lia dua amo, al kiu li ĉiam restas fidela. Dum sia studado en la Sofia Universitato li estas elektita kiel sek-

retario de la Sofia urba E-societo „Maksim Gorki“; en 1956 li jam estas prezidanto de Bulgara Esperantista Junularo kaj membro de la estraro de TEJO. Li estas ankaŭ unu el la redaktoroj de la internacia bulteno „Esperanto en festivalo“, eldonata en Sofio.

Post sia reveno en Pazarĝik la juna instruisto de matematiko estas elektita kiel sekretario de la loka E-societo „Radio“. Pli ol 20 jaroj Petko Arnaudov estas agema membro de CE de BEA. Ĉiun lernejon li gvidas kursojn por komencantoj kaj progresintoj. Li estas unu el la iniciatintoj kaj organizantoj de la unua kurso por E-instruistoj, organizita en 1963 en montodomo „Kladova“, en la regiono de urbo Velingrad.

Lia faro estas ankaŭ la esperantlingva eldono de prospekto pri la Etnografia Muzeo en Pazarĝik, samkiel surbendigita klariga teksto en Esperanto pri la ekspozicio de la muzeo mem, kiun ĉiu vizitanto laŭdezure povas aŭskulti.

K-do Petko Arnaudov estas unu el la iniciatintoj de la propra klubo de E-societo „Radio“. Li persone partoprenis la konstruadon, oferinte multajn fortojn kaj tempon por tiu grava laboro.

Krom ĉio supre dirita oni devas aldoni, ke Petko Arnaudov estas aktivulo de la Patrolanda Fronto, aktive partoprenas la laboron de la Distrikta Fakto de Kulturo kaj la laboron de aliaj soci-politikaj organizaĵoj en sia urbo.

Petko Arnaudov estas bone konata al la esperantistoj en Bulgario kaj havas multajn amikojn-esperantistojn eksterlande. Li estas aŭtoro de du broŝuroj: „E-agado en la distrikto de Pazarĝik“ kaj „Historio de la E-societo en Pazarĝik“. Lia poŝtkesto ĉiam estas plenplena de leteroj — al li skribas E-korespondantoj el multaj landoj.

Pro sia fervora kaj multflanka E-agado Petko Arnaudov estas distingita per la honora insigno de Bulgara Esperantista Asocio, per la titolo „Rekonita Lektoro de Esperanto“ kaj per la jubilea medalo „Bulgario 1300“.

Ĉiu, kiu konas Petko Arnaudov, estas nepre ravita de lia simpatia amika rideto, de lia preteco helpi al ĉiu laŭeble kaj de lia neelĉerpebla energio kaj agemo. Eble tio estas la sekreto de liaj multnombraj amikaj kontaktoj en la tuta mondo?

Okaze de la 50-jariĝo de Petko Arnaudov liaj amikoj-esperantistoj, liaj kolegoj kaj lernantoj elkore deziras al la flama esperantisto, instruisto kaj sociaganto sanen, forton, energion kaj novajn sukcesojn en lia nobla kaj imitinda agado.

N. CARCAROV

LA ARTO DE LA MAJSTRO — NACIA TREZORO



„Se nun ni petus iun el niaj samtempuloj mencii la nomon de iu el la plej konataj kaj elstaraj bulgaraj pentristoj, ni povus esti certaj, ke ni aŭdos la nomon de Vladimir Dimitrov — la Majstro.

Al kio estas ŝuldata tiu rekono fare de pli kaj pli novaj generacioj de kreantoj kaj spektantoj?

La respondo estas tutkomprenebla: al la profunda realismo kaj la neripetebila majstereco, al la originaleco kaj la eterneco de liaj kreaĵoj serĉadoj, al la amo, per kiu li kreas la plej sanktan por ĉiu el niaj samlandanoj — la vivon de la ordinara bulgaro, lian laboron kaj vivmanieron, lian belecon kaj la belecon de la ĉirkaŭanta lin naturo. . . Ni estas fieraj, ke la bulgara tero naskis tian grandan pentriston-humaniston kaj senlaca laborulon kiel Vladimir Dimitrov — la Majstro“.

(El la salutletero de TODOR JIVKOV — ĝenerala sekretario de CK de BKP kaj prezidanto de la Ŝtata Soveto de PR Bulgario al la solena kunveno okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de la popola pentristo Vladimir Dimitrov — la Majstro)

La 1-an de februaro 1982 finiĝas cent jaroj de la naskiĝo de la originala bulgara pentristo Vladimir Dimitrov — la Majstro.

La centjara datreveno de la Majstro ebligas

al ĉiu bulgaro ree taksi la signifon de lia riĉa kaj multflanka kreoheredaĵo, penetri en la spiritan mondon de la kreanto, pensulo kaj humanisto, eksenti lian tuthomaran idealon pri beleco kaj harmonio en la vivo.

La nomo de Vladimir Dimitrov — la Majstro estigis simbolo de belarta perfekteco, de civitana porpaca aktiveco, de homa modesteco, abnegacio kaj morala pureco. Intime ligita kun la sorto de sia patrujo — Bulgario, en siaj bildoj, kies temojn li ĉerpas el la trezorejo de la naciaj vivmanieroj kaj folkloro, la pentristo kreis tutan galerion de neltransiraj pro sia ideo kaj belarta valoro verkoj. Kun aparta amo la pentristo prezentas en siaj bildoj la vivmanieron de la kamparanoj, popolfestojn, la ĝojon pro la kamp-laboro, k. a., serĉante la karakterizajn trajtojn de la bulgara nacia tipo. Sur la fono de oraj grenspikoj kaj de florantaj aŭ pezaj pro la maturaj fruktoj arboj li pentras kamparanojn kaj kamparaninojn kun sunbrunigitaj vizaĝoj — portantoj de vivĝo kaj de morala kaj korpa beleco. Li serĉas novajn formojn por rekrei la realaĵojn. Li uzas preskaŭ purajn spektrajn kolorojn, kurajo kaj tre konvene harmoniigitajn. Liaj plej gravaj verkoj estas „Mia patrino“ (1919), „Portreto de mia patrino“ (1920), „Aŭtoportreto“ (1920), „Aŭtoportreto“ (1923), „Rikoltisto“ (1936), „Kantantaj junulinoj“ (1935), „Junedzino gvidas la rondodancon en vilaĝo Ŝiŝkovci“ (1935), „Familio“ (1938), „Familio el vilaĝo Ŝiŝkovci“ (1940), „Portreto de knabino“ (1952) k. a.

Lige kun la jubileo de la Majstro estis farita grandskala laboro, rezulte de kiu la originaloj de liaj verkoj, disemataj en bildgalerioj aŭ en privataj kolektoj, ornamantaj salonojn kaj kabinetojn en diversaj oficejoj en la lando kaj eĉ en eksterlando, nun estas kolektitaj en konstanta ekspoziciejo.

Multaj el la verkoj de la pentristo estas ekspoziciitaj en Aŭstrio, Britlando, Hispanio, Italio, Meksikio, Pollando, Sovetunio, Usono, Francio, Federacia Respubliko Germanio kaj Japanio. Biografiaj filmoj, ilustritaj per reproduktaj de la Majstro, estas emisiitaj laŭ la Intervizio kaj la Eŭrovizio. Tiamaniere lia brila kreoheredaĵo estas popularigita ankaŭ en eksterlando — ideo subtenata ankaŭ de UNESCO, kiu inkludis lian nomon en la internacian kulturajn kalendaron por 1982 — ĉar la Majstro estas unu el la plej altaj suproj en la miljara kultura historio de Bulgario.

J. SAPUNĜIEV

BULGARA FOLKLORA FESTIVALO DE MASKITOJ

En la folkloro de multaj popoloj ekzistas ritoj, devenantaj de la antikveco kaj konservigintaj ĝis nia tempo. Plejparte tiuj ritoj estas ligitaj kun paganaj antikvaj popolfestoj honore al iu el la multnombraj mitologiaj dioj.

Jam de jarcentoj en diversaj regionoj de Bulgario oni festas la proksimiĝon de la printempo per antikvaj kaj tre originalaj dancoj kaj prezentaĵoj de kultaj ceremonioj. Ilin plenumas grupoj da maskitoj — la tiel nomataj „kukeri“, en akompano de originalaj popolkantoj kaj orkestroj. Tiuj popolaj festadoj devenas ankaŭ el la antikveco — el Grekio aŭ Romio, el Tracio, kie oni honoris siajn diojn per ludoj, dancoj, kantoj ligitaj kun la nomo de Dionizo — dio de la tero kaj fruktodono, kaj ankaŭ kun la alveno de la printempo.

Por kuraĝigi la konservon de tiuj originalaj popolritoj kaj ilian pluan disvastiĝon, laŭ iniciato de la loĝantaro de la bulgara Sudokcidenta urbo Pernik jam de jaroj dum la vintraj monatoj, oni organizas folkloran festivalon de „kukeri“ (maskitoj).

Jen kiamaniere priskribas la festivalon de „kukeri“ en Pernik la ĵurnalistino **Bela Penčeva**: „En tiu ĉi vintra neĝa mateno tintado de

multnombraj sonoriloj plenigis la stratojn de Pernik. Spite al la senĉese falanta neĝo kaj al la frosto la urbo estis inundita de homoj, alvenintaj per aŭtoj, busoj kaj piede por ĉeesti kaj observi la programerojn de la festivalo de „kukeri“. Ĉirkaŭ la deka horo matene miloj da homoj jam okupis lokojn en la urba stadiono. Komenciĝis la parado de neimageble koloriĉa, brua kaj pitoreska amaso da maskitoj — „kukeri“, marŝantaj kaploke de longa procesio. Post ili venis grupo de „survakari“ (novjaraj gratulantoj), portantaj kornuso-branĉetojn dekoritajn per diverskoloraj rubandoj kaj artefaritaj paperfloroj. Sekvis la impona grupo de „starci“ (maljunuloj), vestitaj en nigraj kaj grizaj kapro-feloj, kun altaj felĉapoj, akompanitaj de grupoj da infanoj en naciaj kostumoj, portantaj centojn da sonoriletoj, kiuj multobligis la bruon en la stadiono. La procesio nombris pli ol kvar mil partoprenintojn el centoj da vilaĝoj de ĉiuj partoj de la lando. Monstroj kovritaj per longharaj ŝafeloj kun demonaj, timigaj multkoloraj maskoj — ĉio, kio povus timigi la „malbonajn spiritojn“, kiuj provokis malriĉan rikolton de gren- kaj vinberkampoj — ĉio estis prezentita en tiu festivalo de folkloraj ceremonioj kaj de la fantazio de popolaj artistoj kaj majstroj!...



Grupo de maskitoj — „kukeri“.

Eble iuj el la legantoj povus kompari tiun festivalon kun similaj folkloraj ceremonioj, viditaj en filmoj, montrantaj populajn kutimojn kaj dancojn de malproksimaj landoj en Latin-Ameriko, Azio aŭ Afriko. Tiuj folkloraj ceremonioj havas ion komunan, profunde ligitan kun la mitologio de diversaj popoloj, kun la streboj de la primitivaj defendaj homoj kontraŭstari la malbonajn

fortojn kaj naturfencmenojn.

La festivalo daŭris pli ol kvar horoj kaj ravis la ĉeestantojn per la riĉeco de nia nacia populararto.

Giaj amuzarangoj ŝajnis senfinaj!... Nur la vesperigo memorigis pri adiaŭo, ĉar la plejparton de festivalanoj atendis longa vojo...“

d-ro DORA BENEVA-NAČEVA

KALI AKRA*

En frua mateno somere
mi sola promenas libere
tra l'ora kamparo brilha
de Dobruĝa nia labela.
Kaj antaŭ mi, kvazaŭ en ia
mirinda fabelo magia,
aperas de Kab' Kaliakra
l'antikva fortres' detruita
kaj ties pint' akra
de l'brila aŭror' lumigita.

De musk' kaj heder' surkreskitaj,
per flava primol' ornamitaj,
en tiu pejzaĝ' grandioza,
en dormo eterna ripozas
ruinoj de muroj granitaj
de la malamik' detruitaj.
Kaj tie — malsupre bluetas
la golfo spegule kvietas
de Kab' Kaliakra majesta
kaj kvazaŭ eterne ĝi estas
kuŝanta senzorge en sino
de ia tenera patrino...

Post longa kurad' furioza
kaj tre lacigitaj de l'ŝtormo,
la ondoj de l'maro ripozas
en dolĉa trankvilo kaj dormo.
Sur borda krutaj pitoreska
skarlataj papavoj nun kreskas
kaj ĉiuj, lulataj de l'vento,
rakontas pri fama evento:

„En fora pasinta epoko
ni loĝis sur tiu ĉi loko —
ni, kvardek blondharaj knabinoj,
unuenskinitaj filinoj
de la vojevodoj bulgaraj.
Tra l'tuta Patrujo tre kara
per kantoj sin portis la famo
pri nia nobleco kaj ornamoj...“

Ho vel' Malamiko kun rab-apetito
invadis la karan Patrujon subite
kaj falis sinsekve fortres' post fortreso;
kaj falis sen tim' vojevodoj senĉese,
post longa sangverŝa batalo obstina, sed fine
ekstis la horo fatala por nia
fortres' Kaliakra. En sturmo rabia
la hordoj, rampante en longaj kolonoj,
kriegis simile al iaj demonoj
kaj falis multnombre lukt-vicoj iliaj,
sed ekvis senhalte sturmantoj aliaj...

Kaj tiam, ni, kvardek bulgaraj knabinoj,
en tiu terura batal' partoprenis:
luktante, ni ĉiuj tre brave nin tenis
kaj kune kun patroj kaj fratoj
renkontis senlace la batalojn
de l'hordaj atakoj senĉesaj.
Sed falis la granda fortreso
de Kab' Kaliakra fiera,
post longa rezist' senespera...

En tiu ĉi lasta krizhoru,
vidinte kun tim' en la koro,
ke venas terura vivsorto,
preferis ni digne la morton:
kun sento fiera, sen ploro,
ni ĵetis nin de l'promontoro
en tiun abismon de l'maro,
sen ia ajn vivobedaŭro...

Kaj tiuj papavoj ruĝantaj,
el nia sang' estas kreskantaj —
el nia sang' iam ŝprucanta
sur tiun ĉi krutan rokpinon...

Ne mortis ni tie ĉi vane
en lukt' kontraŭ fiaj tiranoj:
Patrujo nun vivas libere
kaj ĉiam la homoj surtere
kaj sampatrujanoj tutkore
kantados pri ni rememore:

„Eterne vivantaj ja restas
mortintaj en lukto honesta...“

Jam ĉesis la flustro mistera
de l'mortaj knabinoj hieraj:
zefiro eklulis kviete
graciajn papavajn trunketojn.
Kaj ree en mia animo
eksonis la kanto subluma:

„Eterne vivantaj ja restas
mortintaj en lukto honesta...“

El la bulgara: SIMEON M. SIMEONOV

* KALI AKRA — vorto greklingva, kiu signifas: „Bela promontoro“, per kiu oni nomas la rokan promontoron (kapon) ĉe la bulgara bordo de Nigra Maro, 25 km oriente de urbo Balĉik. Je la fino de la XIV-a jc., ĉe la bulgaraj feŭdestroj Balik kaj Dobrotica ĝi prezentis potencon fortikaĵon. En tiu epoko la turkoj invadis la landon, atakis la fortikaĵon kaj konkeris ĝin, malgraŭ la heroo rezisto de la defendantoj, inter kiuj troviĝis ankaŭ 40 bulgaraj junuloj, kiuj preferis sin ĵeti de la marbordo en la abismon anstataŭ fali en la manojn de la krueleĝaj invadintoj. (Rim. de la Tr.)

AL NOVAJ PLI EFIKAJ LABORMETODOJ

La 27-an de decembro pasintjare okazis plenkunveno de la Urba Estraro de BEA en Sofio. La starigitaj demandoj kaj la prenitaj decidoj prezentas gravan momenton el la vivo de la plej granda E-societo en nia lando.

En sia enkonduka parolado la prezidanto de BEA Aristo Gorov notis, ke la bulgara registaro alte taksis la kontribuon de vico da E-organizaĵoj kaj de apartaj E-aktivuloj por la celebrado de la 1300-jara datreveno de la bulgara ŝtato. Li enmanigis honor-diplomojn kaj la jubilean medalon „Bulgario 1300“ al la honoritaj per tiu alta distingo esperantistoj kaj E-societoj.

La partoprenintoj en la plenkunveno turnis apartan atenton al la propono pri nova strukturo de la Sofia Urba E-Organizaĵo. Sur la loko de la ĝis nun ekzistanta Sofia societo „Maksim Gorki“ ekfunkcios societoj en preskaŭ ĉiuj administraj regionoj de la ĉefurbo. Tiu ĉi deĉentriga permeso al la E-agado atingi la ĉefurbajn kvartalojn, pli ĝuste la kvartalajn organizaĵojn de la Patrolanda Fronto, la legosocietojn k.a., konkeri pozicion en entrepreno kaj oficejoj. La regionaj E-societoj havas la moralan-politikan kaj materialan-teknikan subtenon tiel de la Patroland-frontaj organizaĵoj, kies kolektiva membro estas BEA, tiel ankaŭ de la Bulgaraj Profesiaj Unuiĝoj kaj de la Junkomunista organizaĵo (DKMS).

La plenkunveno pridiskutis ankaŭ proponon pri kreo de Kultur-Kleriga Centro „Maksim Gorki“ en la ĉefurbo. (Ĝi portas la nomon de la ĝisnuna Sofia E-societo „Maksim Gorki“). Tiu ĉi centro, kiu unuiĝas la kompletan kulturalan agadon de la bulgaraj esperantistoj en Sofio, grave stabiligos kaj plivastigos la variajn manifestigojn en la kampo de la ideologia, eduka kaj kultura laboro. La centro ne nur unuiĝos en siaj sekcioj muzikistojn, artistojn, amatorojn, sed direktos sian agadon ankaŭ al variigo kaj pliriĉigo de la spirita kaj kultura vivo de la Sofiaj esperantistoj kaj samtempe per la rimedoj de kulturo propagandas la ideojn de Esperanto.

Al la partoprenintoj en la plenkunveno oni prezentis ankaŭ la projekton por kreo de Instru-Metoda Centro, kies tasko estos gvidi la kompletan instru-edukan laboron, la preparadon de instruistoj, la organizadon de kursoj por instruado de Esperanto en lernejoj, universitatoj, entrepreno kaj oficejoj, en kvartaloj, legosocietoj ktp.

La plenkunveno prenis decidon pri la estonta strukturo de la Urba Estraro de la Sofia E-organizaĵo. Ĝi konsistos el kvin centroj kaj ĉiu centro havas la koncernan gvidanton — gvidanto de la Kultur-Kleriga Centro, gvidanto de la Instru-Metoda Centro ktp.

Kiel la proponoj, ligitaj kun ŝanĝoj en la strukturo de la Sofia E-organizaĵo, tiel ankaŭ la demandoj pri la budĝeto por 1982 provokis viglajn diskutojn, kiuj finiĝis per unuanime prenitaj decidoj.

Sendube la decembra plenkunveno de la Sofia Urba E-organizaĵo estigos turnopunkton en nia E-agado, desegnos novajn pli rezultodonajn metodojn kaj formojn de laboro, celantajn pluan evoluon de la E-movado en la ĉefurbo de PR Bulgario.

RAIM LEVI

ESPERANTO EN LA HIDROMETEOROLOGIO

En la historio de Bulgara Hidrometeorologia Servo (BHMS) la 23-a de decembro 1981 estos enskribita kiel tago, en kiu komenciĝis grandskala propagando de Esperanto kaj ĝia intensa aplikado en la hidrometeorologio.

Pli ol 70 hidrologoj, meteorologoj, komputistoj, oficistoj kaj laboristoj kolektiĝis por fondi klubon „Esperanto“ al BHMS. La kunvenon ĉeestis ing. Petar Todorov — vicprezidanto de Bulgara Esperantista Asocio, Dončo Hitrov — ĉefredaktoro de revuo „Bulgara Esperantisto“, Aristo Kanev — prezidanto de la Urba organizaĵo de BEA en Sofio kaj Zora Ošanska — sekretariino de E-societo „M. Gorki“.

Post konciza prelego pri Esperanto kaj ĝia aplikado en diversaj sferoj de la internacia rilato, farita de Nikola Nikolov — prezidanto de la iniciata komitato por fonda de la klubo, la kunvenintoj unuanime konfirmis ĝian starigon. Kiel unua prezidanto de la klubo estis elektita prof. Kostadin Stanev — direktoro de BHMS. Tio ĉi estas garantio, ke la klubo havos ĉiujn necesajn kondiĉojn por aktiva kaj fruktodona laboro.

En la aprobita klubo regularo estas notite: la klubo havas jenajn celojn kaj taskojn: a) Propagandi kaj disvastigi Esperanton inter la sciencaj laboristoj kaj oficistoj de BHMS b) Per Esperanto diskonigi la agadon de la bulgara hidrometeorologio en eksterlando c) Kontribui por plenumo de la planoj kaj taskoj de BHMS d) Agadi por eldonado kaj disvastigo de sciencaj verkoj, artikoloj, filmoj, broŝuroj k.a. pri hidrometeorologio e) Helpadi siajn membrojn por starigo de korespondaj k. a. kontaktoj, interŝanĝo de libroj, revuoj, prelegoj, sciencaj verkoj k. a. kun kolegoj en eksterlando.

La fondintoj de la klubo aprobis tre detalan jaran agadplanon, pri kies efektivigo respondecas la elektita kvinmembra estraro. Limdatoj por la realigo de ĉiu arango kaj respondeculoj pri ties plenumo ne mankas en la plano.

Estas organizitaj du E-kursoj por komencantoj en kiuj dufoje semajne 50 personoj diligente lernas Esperanton. La kursoj estas kvarmonataj kaj okazas en labortempo.

Kamaradoj St. Dabov kaj At. Tanev verkas „Historion de BHMS. Ĝia E-traduko devas aperi en la kuranta jaro. Oni preparas grandan ekspozicion de korespondadoj: leteroj, ilustritaj poŝtkartoj, glumarkoj, projektoj k. a., kiujn ricevas la klubo kaj ties membroj. Printempe oni organizos interesan E-amuzvesperon.

Se dudeko da eksterlandaj hidrometeorologoj sin anoncos al la klubo, ni traktos kun ili la eblecon okazigi en 1983 la unuan hidrometeorologian E-simpozion en Bulgario aŭ en alia lando. Tio estos la unua paŝo al apliko de Esperanto fare de la Monda Hidrometeorologia Servo.

En la somero de 1982 20—30 membroj de la klubo, kiuj parolas Esperanton, intencas gastigi al siaj kolegoj-esperantistoj en CSSR, Hungario kaj GDR. Proponoj pri korespondado kaj reciproka gastado en 1982 oni sendu al: Bulgara Hidrometeorologia Servo, klubo „Esperanto“, bul. „Lenin“ 66, BG-1184 Sofio, Bulgario.

N. ILIEV

La nova E-lernojaro 1981—1982 komencis jam antaŭ kelkaj monatoj. Ĝi estas rimarkinda pro la fakto, ke oni enkondukis la instruadon de Esperanto kiel fakultativa lernobjekto en la unua kurso de la mezlernejoj. Preskaŭ ĉiuj esperantistoj-instruistoj, rajtigataj instrui Esperanton, klopodis organizi E-klason en sia lernejo. E-kurson en sia loĝloko. Kompreneble, lernantoj dezirantaj lerni la Internacian Lingvon, la lingvon de paco kaj amikeco, la facilan kaj belsonan lingvon, per kiu ili povos havi amikojn en la tuta mondo — estas en ĉiu lernejo.

Pritio oni skribas al ni el Karlovo kaj Razgrad. Kun „Bonan venon en niajn vicojn!“ renkontis la unuajn gekursanojn la kursgvidanto Neno Janev el Gabrovo kaj Saša Nedeva el Varna. En vilaĝo Bratanica — distrikto de Pazargik, 22 gelnantoj, sukcese finintaj pasintjare la unuagradan E-kurson, daŭrigas la lernadon de la Internacia Lingvo ankaŭ ĉi-jare sub la gvidado de sia instruisto Atanas Dimitrov.

En Kjustendil estas organizitaj E-kursoj por civitanoj kaj por la membroj de E-societo „Flamo“, kiu havas novan klubejon. Funkcias ankaŭ du kursoj por junpioniroj. Ilin partoprenas 40 infanoj. Al la etaj novaj esperantistoj instruas la lingvon Maria Labova.

La E-societo en Miĥajlovgrad ankaŭ organizis E-kurson. Tridek komencantoj faras siajn unuajn paŝojn en lernado de la Internacia Lingvo en la kurso de Natalia Tiškova. Kaj Mariana Popova instruas al 42 gelnantoj el la I kaj II kursoj de la Ekonomia teknikumo „Vasil Levski“.

Riĉa kaj varia estis la agado de la E-societo „Solidareco“ en Bankja dum la jubilea jaro. En la raport-elekta jara kunveno, okazinta en decembro pasintjare, la prezidantino de la societo Ivanka Spasova informis pri la vigla partopreno de la membraro en ĉiuj iniciatoj kaj aranĝoj de la riĉenhava laborprogramo. La prezidantino substrekis, ke kune kun aliaj sociaj organizaĵoj la esperantistoj agis pri la transformigo de Bankja en urbon de nefumantoj. La ĉeestantoj esprimis sian pretecon starigi kontaktojn kun la ripozantaj en Bankja geesperantistoj. Pro tio sur ĉiu domo de urba esperantisto estos tabelo kun surskribo: „Esperanto parolata“.

NOVAJ E-SOCIETOJ

La 8-an de decembro 1981 grupo da laboristoj-prestoj, loĝantoj de v. Brestovica, distrikto de Plovdiv, kiuj laboras en la produktada bazo de E-societo „Todor Sofroniev“ — Plovdiv, kaj partoprenas la E-kurson, funkciantan al ĝi, fondis en sia vilaĝo novan E-societon „Viktor“ (la partizana nomo de la esperantisto Kiril Tomov, politika komisaro de partizana brigado „Georgi Dimitrov“, heroe peinte en batalo kontraŭ la faŝismo).

La fonda kunveno estis malfermita de kamarado Georgi Harizanov, kiu parolis pri la celoj de E-movado kaj pri ĝia rolo en la porpaca batalo.

Ni bondeziras al la novaj esperantistoj fruktodonan laboron!

En Ruse startis nova E-societo „Kulturo“. Ĝia prezidanto estas k-do Stojko Cankov. En la societo membras 80 novaj geesperantistoj.

Al E-societo „Kulturo“ — bonan sukceson!

Medicinista E-societo „D-ro Zamenhof“ en Loveĉ estas unu el la plej aktivaj en la lando. Antaŭ nelonge okazis ĝia jara kunveno. En sia raporto la prezidantino d-rino Tjuran Omer faris detalan analizon de la unujara laboro de la societo. Estis speciale substrekitaj la partopreno de esperantistoj-medicinistoj el Loveĉ en la III Internacia Medicinista Konferenco en Ruse pasintjare.

La ĉeestantoj akceptis detalan planon pri la laboro de la societo dum 1982. La plano estas konformigita al la specife de la profesio de esperantistoj-medicinistoj.

La esperantistoj el la tuta lando solene festis la 122-an datrevenon de d-ro L. L. Zamenhof. Venis multaj leteroj de niaj korespondantoj, en kiuj ili informas pri la okazintaj en decembro pasintjare Zamenhofaj festoj. Nature, en ĉiu solenaĵo la plej grava momento estis parolado pri d-ro Zamenhof, saturita de admiro kaj dankemo al la faro de la granda humanisto, kreinto de la Internacia Lingvo Esperanto.

Gojiga estas la fakto, ke en la Zamenhofaj festoj aktive partoprenis multaj lernantoj. Nia kunlaborantino el Varna Saša Nedeva skribas: „La lernantoj de III-a kurso en lernejo „Baĉo Kiro“ estas la plej novaj esperantistoj en nia urbo. Ili komencis lerni la Internacian Lingvon nur antaŭ unu monato, sed jam povis prezenti riĉenhavan literaturan programon en Esperanto“.

Lilia Sotirova el Plovdiv sciigas pri interesa parolado de Dimitar Dimitrov, kiu rakontis siajn rememorojn pri la historia signifo de la Laborista E-societo en Plovdiv. Jordan Angelov parolis pri la plej gravaj periodoj en la 80-jara historio de la E-movado en Plovdiv, pri ĝiaj revoluciaj tradicioj kaj pri ĝia rolo en la kultura vivo de la urbo. La ĉeestantoj estis detale informitaj ankaŭ pri la agado de MEM.

D-rino Emilia Kanjovska el Pleven informas, ke 90 esperantistoj el Pleven, Levski kaj Loveĉ celebris la datrevenon de d-ro Zamenhof per deklamado de verkoj el lia poezia heredaĵo.

En la solena kunveno en Vraca, informas Katja Marinova, la esperantisto-veterano Radoslav Tričkov legis la unuan leteron, skribitan al li de la elstara bulgara esperantisto Ivan Krestanov en 1934. En sia letero Krestanov dividas siajn impresojn pri la kreinto de Esperanto.

Nia korespondanto el Plovdiv Dančo Danĉev informas, ke la Zamenhofan vesperon en la E-societo de blinduloj „Lumo“ ĉeestis Lilia Sotirova, kiu partoprenis la 66-an kongreson de UEA en Brazilo pasintjare. En sia emocia rakonto Lilia Sotirova skizis la bildon de la vivmaniero kaj la moroj de la malproksima kaj malmulte konata ĉe ni popolo de Brazilo. Si rakontis pri la naturaj belajoj de la lando, pri la originala aspekto de la antikva urbo Rio de Janeiro kaj pri la imponeco de la novkonstruita ĉefurbo Brazilio.

La ĉi-jara solena celebrado de la datreveno de d-ro Zamenhof estas plia pruvo pri la aktiva agado de la bulgaraj esperantistoj, ardaĵ propagandantoj de l'Internacia Lingvo.

Naciaj kaj internaciaj aranĝoj de BEA en 1982

N-ro	Dato	Loko	Aranĝo
1.	9 I 82	Sofio	Renkontiĝo de la aktivuloj de Bulgara Esperanto-Muzeo
2.	16-17 I 82	Karlovo	Konsultiĝo kun aktivuloj de la Sciencista kaj Teknikista sekcioj
3.	17 I 82	Sofio	Renkontiĝo de aktivuloj konekse kun la laboro inter infanoj-esperantistoj
4.	17-23 I 82	Vraca	Vintraj feriaj Esperanto-kursoj
5.	30 I 82	Sofio	Renkontiĝo kun la aktivuloj de medicinistaj E-societoj kaj grupoj
6.	30-31 I 82	Plovdiv	Seminario por plialtigo de la rolo de la societa kunveno
7.	30-31 I 82	Kubrat	Vintra amika renkontiĝo esperantista (VARE)
8.	20 III 82	Kjustendil	Scienc-praktika konferenco „75 Jaroj de BEA“
9.	27-28 III 82	Jambol	Distrikta scienc-praktika konferenco „75“
10.	1-10 IV 82	Vraca	Printempaj feriaj E-kursoj
11.	2-4 IV 82	Pleven	Revuo de Esperanto-paŝtalo kaj kanto
12.	2-4 IV 82	Pleven	Ekspozicio de esperantistoj-kolektantoj
13.	5-6 IV 82	Pleven	Konsultiĝo pri la problemoj de la laboro kun ĝemeligitaj urboj
14.	10-11 IV 82	Pisnica	Dutagaj kursoj por plialtigo de la kvalifiko de distriktaj gvidkadroj
15.	15. IV 82	Kazanlak	Solenaĵoj pri Ĉudomir
16.	17-18 IV 82	Ruse	Printempa amika renkontiĝo esperantista (PARE)
17.	17-18 IV 82	Ruse	Renkontiĝo de esperantistoj-kooperativanoj
18.	17-18 IV 82	Galabovo	Printempa Esperanto-balo
19.	24 IV 82	Sofio	Plenkunsido de la Bulgara MEM-komitato
20.	24-25 IV 82	Loveĉ	Vespero de la originala kaj traduka poezio
21.	8-9 V 82	Plovdiv	Foira renkontiĝo
22.	9 V 82	Sofio	Konferenco de Virina komisiono
23.	9 V 82	Targoviŝte	Regiona pedagogia E-konferenco
24.	9 V 82	Rila	Regiona pedagogia E-konferenco
25.	16 V 82	Trojan	Regiona pedagogia E-konferenco
26.	16 V 82	Trojan	Regiona renkontiĝo por interŝanĝo de spertoj
27.	16 V 82	Sofio	Regiona pedagogia E-konferenco

N-ro	Dato	Loko	Aranĝo
28.	18-28 V 82	Velingrad	Turista seminario-ripozo „Tra kampoj kaj arbaroj“
29.	29-30 V 82	Jambol	Regiona seminario por aktivuloj de E-societoj
30.	29-30 V 82	Vraca	Internacia recitalo de Botev-poezio kaj oratora konkurso pri Botev
31.	5-6 VI 82	Sofio	Seminario dediĉita al la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Georgi Dimitrov
32.	5-6 VI 82	Karlovo	Festo de la rozo
33.	5-9 VI 82	Sofio	Tagoj de la Esperanto-kulturo — „Sofio 82“
34.	12-13 VI 82	Samokov	Renkontiĝo de esperantistoj el Sudokcidenta Bulgario
35.	14-23 VI 82	Bankja	Festo de minerala akvo, sano kaj longvivado
36.	15-25 VI 82	Targoviŝte	Internacia festivalo de esperantistoj-ŝakistoj
37.	19-20 VI 82	Ĥaskovo	Renkontiĝo de esperantistoj el Suda Bulgario
38.	19-20 VI 82	Varna	Mara amika renkontiĝo esperantista (MARE)
39.	20 VI 82	Burgas	Regiona pedagogia E-konferenco
40.	20. VI 82	Ĥaskovo	Regiona pedagogia E-konferenco
41.	26-27 VI 82	Sofio	Ekzamensio por bulgaraj esperantistoj
42.	1-10 VII 82	Borima	Seminario — somera ripozo
43.	3-14 VII 82	Petriĉ	Internacia Esperantista turista marŝado „Pirin 82“
44.	8-31 VIII 82	Debnevo	Internacia junulara arkeologia brigado
45.	19-29 VIII 82	Vidin-Silistra	Remboata marŝo laŭ Danubo
46.	18-28 IX 82	Velingrad	Internacia seminario ripozo
47.	25-26 IX 82	Veliko Tarnovo	Scienc-praktika konferenco, dediĉita al la 75-jara jubileo de BEA
48.	2-9 X 82	Borima	Seminario-ripozo „Ora Aŭtuno“
49.	3-4 X 82	Sliven	Amika turista renkonto „Karandila“
50.	9-10 X 82	Plovdiv	Renkontiĝo de esperantistoj-fervojistoj
51.	16-17 X 82	Petriĉ	„Kaŝtana Vespero“
52.	23-24 X 82	Bansko	Recitalo de revolucia poezio de Nikola Vapcarov
53.	23-24 X 82	Jambol	„Vespero ĉe Tunĝa“ vespero de originala kaj traduka prozo
54.	4-5 XII 82	Pleven	Nacia studenta renkontiĝo

VERDAJ STELTOJ

PENTRAJO

Mi ŝatas rigardi infanajn pentraĵojn. La pliparto da ili estas gajaj kaj ĝojigas la koron. Sed mi tamen memoras infanan pentraĵon tre malĝojan, pentritan antaŭ kvardek jaroj. Mi vidis ĝin antaŭ ses aŭ sep jaroj en Prago. Kaj mi ne povas forgesi ĝin. Eĉ mi tute klare rememoras la subskribon: Eva Hajmerova — dekjara, la koncentrejo Beždek.

La tuta pentraĵo estas en nigro. Ĉirkaŭ longa mangotablo estas vicigitaj infanoj. Antaŭ ĉiu infano estas telero, sed neniu mangas. La infanaj korpoj similas skeletojn. En iliaj okuloj estas timego kaj teruro. Kontraŭ ili, per direktitaj pafiloj, kun grimaco de malamo sur la vizaĝoj, staras SS-soldatoj.

La malgranda pentristino sukcesis prezenti tre ĝuste kaj juste la vivon en la faŝista koncentrejo. Ĉar unu el la pentritaj infanoj estas la eta Eva mem.

SPERTA ŜOFORO

Ni kun Petro ŝatas ĝojajn pentraĵojn. Tiu ĉi ĉeha knabo montris al mi jenan pentraĵon: infanoj, kiuj sin amuzas. Sub ĝi estis subskribo: „La plej bela loko en Prago.“

Mi demandis lin:

— Kie estas tiu ĉi loko?

— Ĝi estas la Parko de Kulturo — respondis Petro.

— Ĉu vi promenis min tien?

La klaraj okuloj de la knabeto ridetis kun preteco:

— Ni iru! — li diris.

La Parko de Kulturo estis apud la urbo. Tie estis multaj infanoj kaj gepatroj. Mi ne sciis kien iri, sed Petro tuj decidis.

— Venu unue ĉi tien!

Tie la infanoj penis trafi per pilkoj en plej diversaj objektoj.

Petro pagis kaj prenis pilkon. Li celis kaj faligis gnomon en blua vesto.

La premio estis bildkarto de Prago. Tio instigis lin afable inviti min:

— Venu, mi promenis vin laŭ la urbo!

Ni sidigas en malgranda ruĝa aŭto, ne pli granda ol lerneja benko. Petro koncentrite direktas ĝin. Tio ne estas facila afero — la multnombraj aŭtoj konstante kunpuŝigas. Sed Petro faris nek unu katastrofon. Li estas bona ŝoforo kaj lia vizaĝo brilas pro ĝojo.

LJUDMILA PASPALEEVA

VERO KAJ MALVERO

Foje la Vero kaj la Malvero eniris drinkejon. Tie ili manĝis kaj trinkis ĝissate. Antaŭ ol foriri, la drinkejmastro demandis ilin:

— Nu, bone, vi manĝis kaj trinkis, sed kiu pagos?

La Malvero kolere sin turnis al la drinkejmastro kaj diris al li severe:

— Ja mi pagis al vi! ... Aŭ vi volas, ke mi pagu al vi po dufoje?

La homo estis konsternita de tiu ĉi respondo.



— Pripensu, mi petas, ĉu vi ne havas eraron? Vi donis al mi nenian monon.

— Nel! Mi pagis al vi! — kriis la Malvero.

— Nel! Vi tute ne pagis!

— Mi pagis! ...

— Vi ne pagis al mi! Kial vi tiel parolas?

— Mi pagis al vi, he homo, mi pagis! — ekkriis laŭtvoĉe la Malvero.

La homo, vidinte kia estas la afero, sin turnis al la Vero, kiu pace kaj silente flankenstaris, kaj diris:

— Kaj vi, Vero, kial vi silentas?

— Sed kion fari, ja mi kune kun la Malvero manĝis kaj trinkis — respondis la Vero.

ELIN PELIN



El nia leterkesto

LA LEGANTOJ SKRIBAS

Lastatempe la redakcio de la revuo ricevas multe da materialoj por publikigo. Kreskas ankaŭ la nombro de leteroj, en kiuj niaj legantoj skribas pri movadaj, sociaj, lingvaj k. a. problemoj. Iuj el la starigitaj demandoj estas interesaj por ĉiuj legantoj de la revuo, pro tio ni decidis aperigadi iujn leterojn aŭ fragmentojn de ili en la tradicia rubriko „El nia leterkesto“. Ni esperas, ke la rubriko fariĝos ŝatata tribuno de nia legantaro, kie oni povos koncize ion diri al la ceteraj abonantoj de la revuo.

NEPRE LEGBLAJ ADRESOJ SUR LA KORESPONDAJOJ

„De tempo al tempo mi ricevas leterojn, sur kiuj la adreso estas skribita nelegeble per mano. Ofte eĉ kopii tian adreson ne eblas. Sur la kovertoj kaj en la letero devas esti klare per presliteroj skribita la adreso de la sendinto. Sur la koverto necesas en okazo de translokiĝo de la ricevinto, por ke la poŝto resendu la korespondadojn, kaj sur la letero necesas adreso, ĉar ofte koverton oni forĵetas aŭ prenas filatelisto...“

N. PETKOV, Smoljan

EFIKA PROPAGANDO

Ĉiu esperantisto malmultekoste kaj efike povas propagandi la lingvon, se sur la kovertoj de siaj korespondadoj, gluas glumarkon, stampas aŭ skribas „Esperanto — internacia lingvo“. La korespondado, ĝis kiam atingas la ricevinton, estas manipolata de multaj poŝtistoj. Ankaŭ liaj familianoj rigardas la ricevitan poŝtaĵon. Multaj ĝesamideoj forgesas tiun ĉi malgrandan, sed tre efikan propagandon, kiu montras al la mondo, ke Esperanto estas aplikata kaj praktikata.

V. ILIEV, Sofio

ADRESOJ SERĈATAJ

La aperigo de adresoj de korespondemuloj estas neceso ne nur por novaj esperantistoj. Pro tio oni aperigu la rubrikon „Dezirata korespondi“ en ĉiu kajero. Dum la malvarmaj monatoj ĝi estu kion eble pli ampleksa, ĉar tiam plej multe oni korespondas.

N. NIKOLOV, Sofio

AL LA 1500-JARIĜO DE KIEV

En 1982 sub la aŭspicio de UNESCO la antikva ĉefurbo de Ukraina SSR — Kiev, festos sian 1500-jaran jubileon. Tiukaze la gelnantoj el du Kievaj elementaj lernejoj invitas la bulgarajn infanojn-lernantojn partopreni la konstantan porpacan ekspozicion-konkurson de infanaj verkoj (pentraĵoj, memoraĵoj, rakontoj tradukitaj en Esperanto aŭ en rusa lingvo, k. a.). La plej bonaj kontribuoj ricevos specialajn jubileajn premiojn.

Salutkartojn kaj materialojn oni sendu al jenaj adresoj:

Sovetunio

Su-252 035

Kiev-35

ul. Kudrjašova, 12

ŝkola 221

Interklubo

Sovetunio

Su-252 035

Kiev-35

ul. Rossijskaja

ŝkola 160

Interklubo

Svetlana Pogorelaja

FORPASI KARMEMORA AMIKO

Antaŭ nelonge venis informo pri forpaso de la plej eminenta vjetnama esperantisto k-do Nguyen Van Kinh.

„Mi konatiĝis persone kun li dum la 48-a UK de Esperanto en Sofio. Li estis veninta el Moskvo, kie li plenumis la gravan funkcion de ambasadoro de Vjetnamio. Li estis amiko de multaj sovetaj esperantistoj kaj fojfoje aperigis en prestiĝaj sovetaj revuoj artikolojn por kaj pri Esperanto. Kiu nur unufoje havis kontakton kun li, tiu konservos la impreson pri lia nobla figuro dum sia tuta vivo. Li estis inda reprezentanto de la heroo vjetnama popolo, kiu brave batalis kontraŭ la fremdaj agresantoj — Francio, Usono, Ĉinio.“

Ni interŝanĝis leterojn aŭ gratulkartojn okaze de gravaj revoluciaj festotagoj. Pere de vjetnamaj esperantistoj, vizitantoj ĉu Universalan kongreson, ĉu ĝeneralan konferencon de MEM aŭ konsultigon de E-asocioj el socialismaj landoj, li ĉiufoje sendis al mi amikajn salutojn.

Poste k-do Kinh revenis al Vjetnamio kaj okupis la postenojn de prezidanto de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio kaj de la Societo por Vjetnama-Soveta Amikeco. Sub lia prezidanteco VPEA daŭrigis sian noblan agadon por konigi al la monda esperantistaro de la barbaraj de l' usona imperiismo en Vjetnamio. La reimageble granda nombro da E-libroj kaj gazetoj eldonataj de VPEA sub ege malfacilaj cirkonstancoj pravas la neordinaran energion de niaj bravaj vjetnamaj amikoj.

Antaŭ certa tempo oni solene celebris la 25-jaran jubileon de VPEA. Ĉeestis ankaŭ k-do Kinh, kiu rajtis fieri pri la sukcesoj de VPEA, ĉar parto da ili estas ŝuldata ankaŭ al li.

Bedaŭrinde, ne pasis longa tempo kaj k-do Kinh lasis la vjetnaman esperantistaron kaj siajn multnombrajn amikojn tra la tuta mondo funebri pro lia morto.

Ni kliniĝu antaŭ la karmemora kamarado kaj amiko, aminda homo kaj ŝatata esperantisto Nguyen Van Kinh.

NIKOLA ALEKSIEV,

honora prezidanto de MEM



DEZIRAS KORESPONDI

BULGARIO

E-societo „D. Sasonov“, 4230 Asenovgrad.
ESPU „Lenin“ (lernejo) — 9-a klaso, 4230, Asenov-
grad.

Angelo Cirpanski (13-jara), ul. „Sini vrh“ 55, 4230,
Asenovgrad.

Margarita Ĥr. Ivanova (45-jara), ul. „Al. Djaković“
18, 9000 Varna.

Justingar Mehmedov (22-jara fraŭlo), bl. „Canko
Marinov“, vh. A, 5500 Loveč — kolektas insignojn.
Ivanka Krumova, ul. „Car Krum“ 29, 5500 Loveč.
Bojan Georgiev Mihajkov, ul. „L. Karavelov“ 8,
2227 v. Bojurište, Sofia.

Nikolaj Petkov Angelov (26-jara fraŭlo), v. Goran
5552, Loveč.

Viktoria Dimitrova (13-jara), bl. 24 zavodski, 5500
Loveč — kolektas BK, monerojn, gramofondiskojn.
Georgi Dočev (30-jara), bl. „Canko Marinov“, vh. A,
5500 Loveč.

Mehmed Jašarov Mehmedov (30-jara) O.Z.S. 5500
Loveč, interesigas pri Rock-muziko.
Ivanka Kančeva, ul. „Cačo Sjarov“ 45, 5500 Loveč.
Danail Marinov (19-jara), bl. „Canko Marinov“,
ap. 31, 5500 Loveč.

Ilian Petrov Iliev (18-jara), bl. 206, vh. B, ap. 10,
5500 Loveč.

Dobrin Ivanov, 5553, v. Joglav — Loveč.
Tatjana Dekova (24-jara), zavod „Balkan“, 5500
Loveč.

Tjursjel Mehmedov, bl. „Canko Marinov“, et. 2,
5500 Loveč.

Jordanka Marinova, v. Aleksandrovo, 5500 Loveč.
Ĥristina Ivanova, bl. 25, et. 3, ap. 13, 5500 Loveč.
Joto Spasov, ul. „Georgi Dimitrov“ 215-a, 5500 Loveč.
Kalinka Todorova, v. Joglav 5553 Loveč.

Margarita Vasileva Atanasova (22-jara), v. Umarevci
5541 Loveč.

Miljo Milčev, v. Slavjani 5565 Loveč.
Milčo Berov ul. „Klokotnica“ 25, 5500 Loveč.
Sonja kaj Ivan Ilievi, bl. Montagi 2, vh. B, et. 5,
ap. 13, 5500 Loveč.

Aneta Asenova, ul. „Ambarica“ 1, 5500 Loveč.
Petar Stojanov (ingeniero), str. Sofroni 163, Sofia —
kun ĉi, interŝ. BK kaj PM.

Ivanka Denčeva (48-jara), 9000 Varna, str. „Al.
Kačinski“ 8 — pri poezio, literaturo, turismo.
Stefan Sabčev (30-jara), 5500 Loveč, str. „Patriarĥ
Evtimij“ 31 — agronomo.

Georgi Georgiev (40-jara fraŭlo) — 5500 Loveč, bl.
202, vh. E.

Gelernantoj el Ekonomia teknikumo (15–16-
jaraj) — kun ĉi. Adreso de la instruistino: Mihajlov-
grad 3400, str. „Morava“ 13, Mariana Popova.

VENEZUELO

Gestudentoj-esperantistoj dez. korespondi pri ĉi:
Fino Brigitte Clarac, Av. Mariskal Sucre, Edif.
Zenit, Piso 4, № 4-B, San Bernardino, Caracas 1011 —
pri muziko, ekskursoj.

S-ro Mario H. Garcia C., Qta „Yanet“, Calle 15,
Urb. Atlantida, Catia La Mar, Dpto Vagnas — Cara-
cas 1162 — pri futbalo kaj atletismo.

S-ro Eduardo Medina Morales, Conj. Resid. Cali-
fornia Norte, Edif. 3, Piso 15, Apto 151, Caracas
1070 — pri muziko.

— F-ino Iris Betzaida Aranguren, Calle Uorania
Nr 41, Magalles Catia — Caracas 1030, Venezuela
— pri sporto kaj dancoj.

— F-ino Maria Coromoto Camps, Av. Bellas Artes,
Ota Caribay, Los Chaguamos, Caracas 1041. Vene-
zuela (ekskursoj).

SOVETUNIO

Kočura Vladimir (40-jara) — 255740, Kievskaja
oblast, Borodinskij rajon, Nemeŝajevo, str. „Jujnaja“
50-8 — kun ĉi pri ĉi, precipe pri vivo naturo,
sporto.

Podoličenko, Ĥjodor (19-jara) — 662840, Krasnojars-
skij kraj, Ermakovskij rajon, p. Tahzibej — kun
ĉi pri ĉi.

Kanova, Nataŝa — Krasnodarskij kraj, Lesosi-
borsk, Gorkogo 83-4.

Danilov, Aleksej — 347000, g. Belaja Kalitva,
Rostovskoj oblasti, ul. „Samuratova“ 26.

Kovnators, (Naumo 23-jara), 228730, Latva SSR,
Aluksne, Omskas 16-2 — pri historio, literaturo,
infanaj aferoj.

Sviridov Vladimir (40-jara), str. Vinodela Jego-
rova 38, Massandra.

Urbanskaja Tatjana (25-jara fraŭlino, ekonomiisti-
no), per. Slobodskoj 4, Alupka.

ĈEĤOSLOVAKIO

J. V. Haering (teknikisto, Ĥlavni 62, 25207 Stěšho-
vice ČSSR — pri ĉi, interŝ. IPK.

RUMANIO

Condruz Sarel (22-jara), B-dul. Ion Sulea, Nr. 69A,
Bl. R5, Sc. E, Ap 164, București — precipe kun bul-
garoj, kaj ankaŭ kun geamikoj el aliaj landoj pri mu-
ziko, sporto, vojaĝoj k. a.

Lavrinenko Teodor Mugurel (28-jara teknikisto en
ŝipkonstruejo), str. H. Radulescu nr. 92, Oltenita-835,
Rumanio — kun gesamideanoj el Bulgario.

Redakta komitato

Dončo ĤITROV (ĉefredaktoro), Marin BACEV, Vasil
BOROVANSKI, Prof. Vasil ČOČOV, Dimitar ĤAĤIEV,
Kraŝtju KARUCIN, Ĥaim LEVI (vicĉefredaktoro),
Flori NIKOLOV, Lidia RAEVA.

Administranto: Kalinka VASILEVA

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919,
distingita per ordeno „Cirio kaj Metodo“ — I grado.
Ĥdonkvanto 6500.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97.


1303 Sofia, Bulgario

P. K. 66

1 000 Sofia

tel. 32-40-68, 31-00-29

LA ANTIKVA TEATRO EN PLOVDIV



Tiu ĉi valora monumento de nia arkitektura heredaĵo — iu el la plej gravaj arkeologiaj trovaĵoj en nia lando dum la lastaj jaroj — estis kreita en la unua duono de la II jc kaj ekzistis ĝis la fino de la IV jc.

La subĉiela halo („teatron“) konsistis, kiel montras la esploroj, el 28 vicoj da amfiteatre situantaj sidlokoj por 3500 spektantoj. Plene konserviĝis la pli malsupraj 14 vicoj. La benkoj, altaj 38 cm kaj larĝaj 70 cm, estas el marmoro. La duonronda „Orchestra“ havas diametron de 28 m. De la suda flanko estas la konstruaĵo destinita por la artistoj („skeno“). La scenejo („proksenia“), sur kiu okazis la teatraj prezentaĵoj, estis alta 3,10 m. Ĝian fasadon formas vico da ionikaj duonkolonoj kaj dekoraciaj ŝildoj.

La amfiteatro impresas per siaj dimensioj kaj beleco. Al la ĉefenirejoj kondukas larĝaj aleoj pavimitaj per facetitaj granitaj platoj.

La antikva teatraĵo estis malfermita por la publiko en oktobro pasintjare.

FILATELO

La unuaj bulgaraj poŝtmarkoj



Estis jaro 1879. Pasis jam 39 jaroj de post la 1-a de majo 1840, kiam en Londono estis emisiita la unua poŝtmarko en la mondo — la famekonata Penny Black (Peni Blek, t. e. la Nigra Penco). La marko prezentis la vizaĝon de la brita reĝino Viktoria, kiam ŝi estis 18-jaraĝa; ĝi estis presita per nigra koloro de la konata firmo Perkins, Bacon and Patch (Parkins, Beĵkan kaj Peĉ), kaj diference de multaj nunaj poŝtmarkoj ne havis perforadon.

Por la bulgaroj la tago de 1-a de majo 1879 estas tamen memorinda pro alia kialo: ĝi estas naskiĝdato de la bulgara poŝtmarkel-

donado. Tiam estis emisiitaj la unuaj bulgaraj poŝtmarkoj — la t. n. „Centimoj“. Oni nomis ilin tiel, ĉar ĝis la 9-a de aprilo 1881 en Bulgario la levo ankoraŭ ne cirkulis kiel monunuo kaj nia lando apartenis al la sistemo de la Latina monunuigo, kiu havis kiel bazon la francan frankon kun ties subdivido — la centimo.

En la Stata Presejo en Peterburgo (laŭ projekto de pentristo Fr. Kepler, kaj laŭ aliaj fontoj — de Georgi Jakovlev Kirkov, la unua direktoro de la Stata presejo en Sofio, estas presita serio de 5 markoj — de 5 centimoj, 10 centimoj, 25 centimoj, 50 centimoj kaj 1 franko. Ĉiuj kvin valoroj havas la saman formaton kaj subjekton — sur ili estis prezentita leono en elipsa kadro, staranta sur siaj malantaŭaj piedoj. La cetera spaco estas okupita de ornamoj. La preskvanto varias inter 50 000 kaj 250 000 ekzempleroj, presitaj sur folioj de 100 pecoj, la papero estas diversdika, kun filigrano, akvomarkoj, kaj de ĉiu valoro estas en pli aŭ malpli helaj nuancoj.

La „Centimoj“ estas aparte valoraj sur uzita koverto, kaj kiam ili estas stampitaj per unuataga stampilo — „1-a de majo 1879“. Ili cirkulis ĝis 1896. Jam vicon da jaroj ili estas fiero por la kolekto de ĉiu filatelisto.